


Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 25-an de januaro 2022

En tiu ĉi jaro (2022) ni solenas la 200-an datrevenon de naskiĝo de silezia fondinto de moderna genetiko **Gregor Johann Mendel** (1822 – 1884).



Li naskiĝis en Hynčice. Lia gepatra lingvo estis germana lingvo, sed en Moravio li baldaŭ ellernis ĉeĥan lingvon. Li estis aŭgustinana monaĥo, kiu loĝis kaj laboris en Brno. Post forpaso de abato kaj granda filantropo **Cyril František Napp** (1792 – 1867) Mendel fariĝis abato de monaĥejo. Li okupiĝis pri meteorologio kaj botaniko. Dum siaj eksperimentoj kun pizo (*Pisum sativum*), *Mirabilis jalapa*, *Hieracium* spp. kaj aliaj organismoj li uzante statistikon malkovris bazajn heredecajn leĝojn. En la jaro 1866 li publikis rezultojn de siaj eksperimentoj en la libreto *Versuche über Pflanzen-Hybriden* (Eksperimentoj kun Plantaj Hibrido).

Mendel kaj rezultoj de lia laboro estis dufoje forgesitaj. Unuafoje post lia morto (1884), kiam monaĥoj laŭkutime bruligis lian propran. En komenco de la 20-a jarcento okcidentaj sciencistoj **Hugo de Vries** (1848 – 1935), **Carl Correns** (1864 – 1933), **Erich von Tschermak** (1871 – 1962) kaj **William Bateson** (1861 – 1926) malkovris forgesitan Mendel-on. Usona genetikisto **Thomas Hunt Morgan** (1866 – 1945) faris eksperimentojn kun vinagra muĝo *Drosophila melanogaster*. Homo havas 46 ĥromozomojn, bovo 60 ĥromozomojn, sed la muĝeto *D. melanogaster* havas nur 8 ĥromozomojn. Oni kapablas ĝin facile bredi en laboratorioj, tial ĝi estas taŭga eksperimenta besto. Morgan uzante drozofilojn konfirmis genetikajn leĝojn de Mendel.

Sed la dua forgeso estis pli trista. En historio de nia lando estis la erao, kiam genetiko de Mendel estis malpermesita. En la jaro 1952 (130 jaroj post naskiĝo de Mendel) eĉ edukitaj homoj timante pri siaj karieroj pri Mendel „forgesis“. Tio okazis en socialisma Ĉeĥoslovakio, kiu post la dua mondmilito apartenis al duonkolonioj de Sovetunio.

Stalin

Pri soveta diktatoro Stalin ni parolu nur koncize.

Josif Vissarionoviĉ Ĝugaŝvili (1878- 1953), kiu havis la kromnomojn **Stalin** (ŝtala viro) kaj **Koba** (kartvele: honorigita; laŭ nomo de iu kartvelia rabisto), estis oseto (ne kartvelo), kiu amis nek kartvelojn nek rusojn (laŭ **Josif Iremaŝvili** (1878 – 1944). Lia patrino estis ortodoksa kristanino, bonkorulino. Ŝi estis nur 20-jara, sed Josif estis jam ŝia la kvara infano. Li naskiĝis kun kunkreskitaj fingroj de piedoj. Unu lia brako malbone moviĝis. Lia patro Vissarion Ĝugaŝvili, ŝuisto kaj poste laboristo en fabriko, estis ebrulo, kiu lin kruele batadis. (Ni povas trovi la saman situacion „patro ebrulo – patrino bonkorulino“ ankaŭ en biografio de Hitler.) Ankaŭ infanoj Josifon ofte batadis kaj ĉikanis, ĉar li per unu brako de kapablis sin efike defendi. Kiam Josif suferis de variolo, kiu malbeligis liajn facojn, lia patrino, promesis al Dio, ke se Josif la malsanon transvivis, li fariĝos ortodoksa pastro, ruse *pop* (paŝtisto de ortodoksa ŝafaro / *пастырь овец православных*). Tial Josif vole-nevole ekstudis en ortodoksa seminario en Tbilisi. La 29-an de majo 1899 oni lin el la seminario ellasis. Tio ne okazis kaŭze de kaŝa legado de marksisma literaturo, kiel poste rakontis stalinanoj, sed kaŭze de malbonaj studadaj rezultoj, ĉar Josif pri ortodoksa religio ne interesiĝis. Kaŭze de siaj handikapoj kaj malalteco Josif ne kapablis rekrutiĝi en caran armeon. Paradokse tiu nesoldato poste havis specialan titolon de la plej granda soveta militestro (*generalissimus*), ordonis al marŝaloj kaj generaloj kaj sendis al morto milojn da soldatoj.

Duonedukita Stalin trovis sian lokon inter kontraŭcaraj opozicianoj. Li bolŝevikiĝis. Bolŝevikoj estis flanko de ruslandaj socialaj demokratoj, kiu en la jaro 1903 dum unu renkontiĝo havis plimulton (*большинство*). Tial ili nomiĝis bolŝevikoj Alia flanko havis malplimulton (*меньшинство*) kaj ricevis la nomon menŝevikoj. Paradokse en historio la bolŝevikoj neniam plu havis plimulton – fakte ili estis malplimultuloj, menŝevikoj.

En la jaro 1907 Stalin aranĝis rabistan atakon kontraŭ transporto de mono, kiu celis en bankon de Tbilisi. Tio estis brutala rabado en stilo de usonaj gangsteroj. Bolŝevikoj uzis pafilojn kaj granatojn. Tiam mortis 40 homoj. Eĉ al multaj bolŝevikoj ne plaĉis, ke inter ili estas kruela bandito Stalin, sed sukcese ŝtelita mono plenumis bolŝevikan kason kaj Lenin malpermesis pri krimo de Stalin plu paroli.

Stalin estis tre suspektema. Li ekzekutigis ne nur siajn malamikojn, sed ankaŭ siajn amikojn kaj aliancantojn. Li ŝatis fumi, manĝegi kaj drinki. Li mortis kaŭze de cerba atako (la 3-an de marto 1953). Paradokse eĉ nun 45 % da rusoj opinias, ke Stalin estis gravulo de ilia historio.

Hispana pentristo **Francisko de Goya y Lucientes** (1746 – 1828) en la jaro 1793 desegnis serion de bildoj „*Los caprichos*“ („Kapricoj“), inter kiuj estas la bildo „Dormo de Racio Generas Monstrojn“. Dum regado de Stalin en Sovetunio vere okazis dormo de la racio.

Olga Borisovna Lepeŝinskaja (*Ольга Борисовна Лепешинская*, 1871 – 1963) apartenis al generacio de Lenin (aĝa diferenco inter ili estis unu jaro). Ŝi naskiĝis en Perm en riĉa familio. Ŝia patro Boris Protopopov estis matematikisto kaj ŝia patrino estis entreprenantino, posedantino de minejoj, fabrikoj kaj vaporŝipoj. Post fino de mezlerneja studado Olga foriris en Sankt-Peterburĝon, kie ŝi alliĝis en subterajn marksanajn rondetojn. Moderne dirite, juna virino fervore studis en „universitato de la vivo“. Kiam ŝi finis sian „studadon“ – kun ruĝa

diplomo (!) – ŝi edziniĝis. Ŝia edzo Pantjelejmon Nikolajeviĉ Lepeŝinskij estis filo de ekskomunikita ortodoksa pastro. Cara reĝimo la geedzojn ekziligis en Siberion, kie ili renkontiĝis kun **Vladimir Iljiĉ Uljanov**, kromnome **Lenin** (1870 – 1924), kiu tiam ankaŭ estis ekziligita, nur 20 km de ili. Iam en la 90-aj jaroj Lepeŝinskaja vizitis sanitaristan kurson. Tio signifas, ke ŝi estis nek kuracistino nek flegistino, nur sanitaristino. En la jaroj 1903 – 1906 la geedzoj estis elmigrintoj en Svisio. En Ĝenevo Lenin havis privatan lernejon por venontaj revoluciistoj. Li kaj liaj lernantoj ŝatis bonajn manĝaĵojn laŭ rusaj receptoj. Olga posedis kuirejon kaj manĝejon. Ŝi kun du helpantinoj kuiris por bolŝevikaj elmigrintoj, ekzemple barĉon kaj frikadelojn.

Post revolucio en la jaro 1917 Lepeŝinskaja fariĝis revolucia komisariino.

La 6-an de aŭgusto 1918 Lenin eldonis la dekreton „**Pri Akcepto en la Universitatojn de Ruslanda Soveta Federativa Socialisma Respubliko**“, kaŭze de kiu malantaŭ universitataj katedroj eksidiĝis malplene edukitaj revoluciistoj kiel Lepeŝinskaja.

Divido de ĉeloj

Lepeŝinskaja estis amikino de Lenin kaj Stalin. Ŝi estis danĝera, ĉar ŝi kapablis siajn oponentojn politike neniigi. Ŝi proklamis primitivan teorion, ke ĉeloj dividas sin nur pro tio, ke en ili akumulas amason da molekuloj. Dormo de racio.

Ostoj

Pri ekesto de ostoj ŝi publikis, ke la ostoj ekestas de molaj histoj, kiuj „prenas kalkon, kalkajn salojn kaj aliajn salojn“ (1928, la broŝuro „**Por Kio Natursciencisto Bezonas Dialektikon?**“). Dormo de racio.

Ŝi faris eksperimentojn, sed tio ne estis la eksperimentoj de sciencistino, nur „eksperimentoj“ de bolŝevika kuiristino. Laboratorio de Lepeŝinskaja situis en ŝia loĝejo. Ŝia filino Olga Pantjelejmonovna kaj bofilo Krjukov al Lepeŝinskaja helpis.

„Vivanta materio“

Lepeŝinskaja kreis la teorion, ke en naturo ekzistas **vivanta materio** (*живое вещество*), kiu havas neniun strukturon, sed iam kaj iel el tiu materio povas ekesti novaj ĉeloj. Germana patologo **Rudolf Virchow** (1821 – 1902) malkovris, ke ĉiuj ĉeloj povas ekesti nur el aliaj ĉeloj. Lepeŝinskaja Virchowon malamis kaj en siaj verkaĵoj lin multfoje atakis.

En la jaro 1934 ŝi „malkovris ekeston de vivantaj ĉeloj el nevivanta materio“. Ŝi diserigis ovoflavojn kaj poste observis en „nevivanta materialo“ ekeston de ĉeloj. Kompreneble, ke ŝi ne observis sterilecon de uzataj iloj, tial ŝi en la materialo povis observi diversajn fungojn, bakteriojn ktp. Dormo de racio.

Eksperimentoj kun hidredoj

Aliaj eksperimentaj objektoj estis hidredoj. Tio estas malgrandaj akvaj bestetoj. Se la hidredo timiĝas, ĝi kreas el sia korpo malgrandan (1 mm) globeton. Se la globeto disvolviĝas, la hidredo estas pli longa ol 1 cm. La hidredo havas cilindran korpon kun ses brakoj. Sube estas kroĉa disko, supre unu aperturo, kiu servas kiel buŝo kaj anuso. La hidredoj sidas sur akvaj plantoj kaj per siaj brakoj kaptas predon, malgrandajn bestetojn. Sur la preniloj situas granda amaso de ĉeloj (knidoj), kiuj enhavas fadenoj kun kaŭsta fluidaĵo. La predo estas per la fluidaĵo paraligita. La brakoj ĝin transportas en buŝon de la hidredo. En korpo de la hidredo la predo estas digestita. Poste la hidredo ellasas neutilajn restaĵojn el sia buŝo/anuso. La hidredoj kapablas malrapide moviĝi. Ili estas hermafroditoj, sed plej ofte ili multipliĝas per simpla burĝonado. Kelkaj specioj vivas en simbiozo kun verdaj algoj, tial ili estas verdaj, aliaj hidredoj estas brunaj.

En Ĉeĥa Respubliko troviĝas ses hidredaj specioj, kiujn oni determinas laŭ strukturo de iliaj knidoj:

Hydra attenuata Pallas, 1766
Hydra circumcincta Scholze, 1914
Hydra oligactis Pallas, 1766
Hydra oxycnida Scholze, 1914
Hydra viridissima Pallas, 1766
Hydra vulgaris Pallas, 1766.

Kial Lepešinskaja faris siajn eksperimentojn kun la hidredoj?

Pri la hidredoj oni scias, ke tio estas bestoj kun grandega kapableco de regenerado. Se oni la hidredon dividas, el ĉiu peceto de la korpo (eĉ el 1/100 de la korpo) povas elkreski kompleta nova hidredo. Lepešinskaja disfrotis la hidredojn kun sablo. Jen „nevivanta materio“! Sed post iu tempo ŝi en „nevivanta“ materio observis vivantajn hidredajn ĉelojn. Jen „ekesto de vivantaj ĉeloj el nevivanta materialo“! Lepešinskaja pri tiu „miraklo“ verkis libron, kiun poste multfoje eldonis sub diversaj titoloj. Oni la libron tradukis en multajn fremdajn lingvojn kaj sukcese eldonis – sed nur en Sovetunio. Dormo de racio.

Batalo kontraŭ maljuniĝo

Manio de Lepešinskaja estis preventa uzado de hidrogenoksokarbonato NaHCO_3 (natria hidrogenkarbonato, popole bikarbonato), manĝebla blanka polvo, kontraŭ maljuniĝo de ĉeloj. Laŭ observado de soveta profesorino Lepešinskaja la ĉeloj maljuniĝas pro tio, ke ĉelaj membranoj maldikiĝas kaj samtempe malmoliĝas. (Neniu alia sciencisto iam tion observis.)

Laŭ Lepešinskaja kontraŭ la maljuniĝo de la ĉeloj efike helpas banado en soluto de NaHCO_3 . Brava matrono tiun eksperimenton faris hejme uzante sin mem kiel eksperimentan raton. Post banadoj en solutoj de hidrogenoksokarbonato ŝi observis bazan urinon („ateston, ke la soluto penetris sian haŭton“) kaj maldikecon. Precipe graso el sia ventro, laŭ ŝia informo, malaperis. Kaŭze de publikitaj rezultoj de la eksperimento en vendejoj la bikarbonato baldaŭ mankis, sed bedaŭrinde aliaj virinoj la miraklojn ne observis. Dormo de racio.

Pomo ne falis malproksime de sia pomarbo

Olga Pantjelejmonovna Krjukova, filino de Lepešinskaja, ne akiris pli altan nivelon de edukado ol ŝia patrino. Kiam ŝi prelegis pri „vivanta materio“, ŝi diris, ke la „vivanta materio“ ne povas esti neniigita eĉ en temperaturo minus 1 000 °C.

„Sed tio ne eblas,“ kontraŭdiris iu el edukitaj aŭskultantoj „la temperaturo -1 000 °C ne povas ekzisti, ĉar jam minus 273 °C estas absoluta nulo.“ Olga Pantjelejmonovna al li respondis bolŝevikmaniere: „Oni vidas, kamarado, ke vi malbone lernis dialektikon. Se ekzistas la temperaturo +1 000 °C, ankaŭ la temperaturo -1 000 °C devas ekzisti!“ Dormo de racio.

Lisenko

Lepešinskaja trovis bonan kolegon en pli juna ukrainia agronomo **Trofim Denisoviĉ Lisenko** (*Трофим Денисович Лысенко*, 1898 – 1976). Li ne estis signifa sciencisto, nur laboristo de provinca Agrokulturista Instituto en Kijevo (tiam Kijevo ankoraŭ ne estis ĉefurbo de Ukrainio).

En la jaro 1929 sovetaĵ komunistoj kolektivigis agrokulturistojn, tial Stalin bezonis senskrupulajn komunistojn, kiuj tiun fian proceson kapablus gvidi. Kaj Lisenko estis sufiĉe senskrupula komunisto.

Kial Stalin tiel multe ŝatis Lisenkon? En la jaro 1906 Stalin en kartvela lingvo eldonis sian verkaĵon „**Anarĥismo aŭ Socialismo?**“ Tie li konkorde de **Jean Baptiste Lamarck** (1744 – 1829) publikis sian opinionon, ke en evoluo de organismoj ludas ĉefan rolon adapto al vivmedio. Jes, ankaŭ influo de vivmedio formas organismojn, sed bolŝevikoj volis ĉion fari rapide, sen respekto al Dia plano de evoluo. Novaj specioj evoluis dum milionoj da jaroj, ne per saltoj. Bolŝevikoj erare opiniis, ke se ili uzurpos potencon, ili kapablos subite ŝanĝi tutan naturon kaj homajn pensojn. Sed se la eraran ideon de Stalin publike ripetis agronomo Lisenko, tio al diktatoro tre plaĉis. Krom tio Lisenko al la diktatoro promesis pligrandigi rikolton de greno.

Vavilov

Al Lisenko tre helpis botanikisto **Nikolaj Ivanoviĉ Vavilov** (1887 – 1944), kiu travojaĝis la tutan mondon serĉante centrojn de evoluo de kulturaj plantoj. Vavilov al sia pli juna amiko Lisenko, ne tre edukita agronomo, helpis penetri inter verajn sciencistojn.

Vernalizo

Oni scias du tipojn de tritiko: printempan kaj travinrantajn. Oni semas la printempan tritikon printempe kaj la travinrantan tritikon aŭtune. La printempa tritiko povas suferi de sekeco, la travinranta tritiko povas pereji kaŭze de malvarmeco.

Lisenko proponis vernalizon de travinranta tritiko. Tio signifis, ke aŭtune oni la grenon per akvo ĝermigis, vintre ĝin lasis kuŝi en sakoj sur neĝo kaj printempe semis. Lisenko al Stalin promesis 30%-an pligrandiĝon de rikolto, sed baldaŭ li eksciis, ke la rikolto ne estos tiel granda, tial li ekpromesis nur 10%-an pligrandiĝon de rikolto, sed poste li jam promesis tute nenion, ĉar la vernalizo de travinranta tritiko fiaskis, kaŭze de perejo de multe da greno vintre, en nenaturaj kondiĉoj.

Pro tio Lisenko sientis ekvernaligis printempan tritikon. Li proponis ankaŭ vernalizi (kovri per neĝo) fruktarbojn, sed tiu projekto ne estis sukcesa. Dormo de racio.

Transformado de plantaj kaj bestaj specioj

Dum siaj eksperimentoj kun greno Lisenko kaŭzis penetron de sarkindaĵoj en semajon. Tio endanĝerigis sovetan agrokuturon kaj kaŭzis malsategon. Ĉarlatano Lisenko timis pri sia vivo, tial li publikis sian teorion pri transformado de specioj. Simple dirite: laŭ Lisenko semoj de unu planta specio povas aliformiĝi. Semoj de travinranta tritiko povas ŝanĝiĝi en semojn de printempa tritiko (1936). Semoj de greno povas ŝanĝiĝi en semojn de sarkindaĵoj. „Ja kolegino Lepeŝinskaja eksciis, ke ekzistas vivanta materio, el kiu povas ekesti ĉeloj! Nun pri tio atestas miaj eksperimentoj kun greno!“

Kompreneble Lisenko ne estis sola. Li havis subtenon de Stalin, potencon kaj monon, tial ĉirkaŭ li svarmis diversaj admirantoj, lernantoj kaj helpantoj. Baldaŭ lisenkanoj akiris novajn sukcesojn en observado de ŝanĝoj de specioj:

tritiko → sekalo
hordeo → tritiko
pizo → vicio
vicio → lento
pino → piceo
abio → pino
alno → betulo
kverko → karpino ktp.

Sur karpeno kreskis branĉoj de avelo! El virusoj povas ekesti bakterioj!

Sed la plej grandan miraklon, ŝanĝon de birdaj specioj, observis Lisenko: birdeto silvio (*Sylvia* sp.) ŝanĝiĝis en kukolon (*Cuculus canorus*)! Kiam Lisenko pri tio prelegis, neniu ridis, neniu dubis, neniu diris, ke tio estas malvero. Dormo de racio.

Suferado de naskitaj bovidoj

Nekritika trotaksado de influo de vivmedio apologis kruelajn kaj sensencajn eksperimentojn kun novnaskitaj bovidoj. „La plej progresemaj agrokulturistoj de la mondo“ (tiel ĉeĥoslovaka komunista propagando oficiale nomigis sovetajn agrokulturistojn) metis la bovidojn en lignajn budojn de Steinmann kaj lasis ilin tie en frosta vetero (-40 °C), por selekti novan sovetan bovan rason, kiu pli rezistos kontraŭ malvarma vetero. La eksperimentoj ne estis sukcesaj, ĉar suferantaj bovidoj mortis de pneŭmonioj aŭ poste nur mizeris kiel malsanaj bestoj. Dormo de racio.

Morto de Vavilov

Lisenko kondukis tre malbone kaj fie al sia eksa amiko kaj helpanto Nikolaj Ivanoviĉ Vavilov, kiu antaŭe al li helpis. Li jam Vavilovon ne bezonis. Vavilov estis vera sciencisto, tial Lisenko kontraŭ li ekintrigis. La 6-an de aŭgusto 1940 soveta kaŝpolico NKVD (rusa mallongigo de Nacia Komisarejo de Internaj Aferoj / *Народный комиссариат внутренних дел, НКВД*) Vavilovon malliberigis. Mondfama botanikisto Nikolaj Ivanoviĉ Vavilov suferis en malliberejo de Saratov, kie li en la jaro 1944 mortis de torturo kaj malsato.

Eksperimentoj kun kartvelia tritiko

En la jaro 1946 Stalin donis al Lisenko 210 g da semoj de kartvelia tritiko (*Triticum turgidum*). La tritiko havis eksterordinare grandajn spikojn. Kaj Lisenko denove promesis pligrandigi rikolton. Jes, la tritiko el Kartvelio havis grandajn spikojn, sed nur se oni ĝin semis tre maldense. Se oni ĝin semis normale, kiel alian tritikon, la spikoj estis malgrandaj kaj kelkaj eĉ ne havis semojn!

En la jaroj 1946 – 1947 Sovetunio suferis de malsato, kiu kaŭzis eĉ lokan kanibalismen.

Profitoj de ĉarlatanoj

Sed ĉarlatanismo estis fruktodona.

Lisenko fariĝis: direktoro de Akademio de Sciencoj de Sovetunio,
direktoro de Akademio de Sciencoj de Ukraina SSR,
direktoro de Tutunia Akademio de Agrokulturaj Sciencoj,
direktoro de Instituto de Genetiko de Akademio de Sciencoj de Sovetunio,
direktoro de Kultivista-Genetika Instituto de Akademio de Sciencoj de Sovetunio,
deputisto de La plej alta Konsilo de Sovetunio
Heroo de Socialisma Laboro.

Trifoje li ricevis Premion de Stalin de la 1-a grado, tio signifas trifoje po 200 000 rubloj. Okfoje li estis honorigita per Ordeno de Lenin.

Ĉarlatanino Lepeŝinskaja fariĝis profesorino, anino de Akademio de Medicinaj Sciencoj de Sovetunio kaj unufoje ŝi ricevis la Premion de Stalin de la 1-a grado (200 000 rublojn).

1948 – Malpermeso de genetiko en Sovetunio

En la jaro 1948 en VASHNIL (Tutunia Akademio de Agrokulturaj Sciencoj, *ВАСХНИЛ, Всесоюзная академия сельскохозяйственных наук имени В. И. Ленина*) lisenkanoj genetikon malpermesis. Tiam 3 000 da sovetaj genetikistoj perdis laboron. Veraj sciencistoj nokte ne povis ekdormi, ĉar ili timis, ke ilin malliberigos NKVD, soveta gestapo. Reĝimo de Stalin malliberigis, rapide juĝis kaj sendis en ekzekutejojn aŭ en gulagojn, la barakarojn, el kiuj ili neniam revenis. (Rusa vorto „gulago“ devenas el la vortoj „ĉefa administraro de barakaroj“, *главное управление лагерей, гулаг*). Dormo de racio.

1950 – Triumfo de Lepeŝinskaja

En la jaro 1950 en Moskvo triumfis ankaŭ 79-jara ĉarlatanino Lepeŝinskaja. Dum renkontiĝo de Akademio de Sciencoj de Sovetunio kaj Medicina Akademio de Sovetunio ŝi publike proklamis, ke teorio de Virchow pri ekesto de ĉeloj estas burĝa kvazaŭscienco, kiun oni devas anstataŭi per teorio de profesorino Lepeŝinskaja. Neniu oponento povis ĉeesti kaj kontraŭdiri, ĉar komunista aparato zorgeme elektis aŭskultantojn – 27 sovetajn sciencistojn, por ke neniu la matronon moku aŭ malice pri io demandu. Tiel Lepeŝinskaja „venkis“ Virchowon. Dormo de racio.

Batalo kontraŭ Mendel kaj Morgan en socialisma Ĉeĥoslovakio

Post la dua mondmilito Ĉeĥoslovakio fariĝis satelito de Sovetunio. Ankaŭ ni havis nian lokan, ĉeĥoslovakian Stalinon. Tiu diktatoro estis **Klement Gottwald** (1896 – 1953), origine meblisto, kiu tutan unu jaron (!) laboris en fabriko en Rousínov kaj poste ĝis fino de sia vivo uzadis la titolon „laborista prezidento“, malgraŭ de vero, ke li estis profesia komunista funkciulo.

Kiam li estis prezidento, en la urbo, kie laboris Gregor Johann Mendel, ĉeĥoslovakaj komunistoj aranĝis agadon kontraŭ genetiko de Mendel. Ekde la 27-an de februaro ĝis la 1-a marto 1952 en Garnizona Domo de Armeo (nuntempa *Besední dům*) okazis la **1-a Ideologia Konferenco de Universitataj Sciencistoj**. La nomo de la konferenco estis „Per Marksisma-Leninisma Ideeco Kontraŭ Kosmopolitismo kaj Objektivismo en Scienco“. En la konferenco partoprenis ĉefa armea estro **Alexej Čepička** (1920 – 1990, bofilo de Gottwald), armeaj oficiroj kaj 950 sciencistoj kaj universitataj pedagogoj. Ekzemple **Karel Raška** (1909 – 1987) el Ŝtata Sanitarista Instituto (Prago), **Dionýz Blaškovič** (1913 – 1998) el Slovacia Centra Biologia Instituto (Bratislava), **Jiří Churý** (1920 – 1970), **Vladimír Komárek** (1923 – 2013) kaj **Richard Harnach** (1898 – 1981) el Bestkuracista Universitato (Brno).

Ministro de informoj kaj klerigado Václav Kopecký finante sian enkondukan prelegon kriis: „**Vivu genia instruisto de tuta progresema homaro, granda kamarado Stalin!**“ Amasmurdisto Stalin avancis al „instruisto de tuta progresema homaro“!

Kaj universitata profesoro Churý en sia diskuta kontribuo diris: „**Estas klara, ke tiun honoran taskon (konstruadon de socialismo) ne povas plenumi la sciencistoj, kiuj staras en pozicioj de reakcia doktrino de mendelismo-morganismo, la doktrino, kiu naskiĝis en epoko de imperialismo, kies interesojn ĝi enhavas.**“

Edukitaj homoj, kiuj verŝajne sciis genetikon de Mendel, en siaj paroladoj kaj diskutaj kontribuoj laŭdis Stalinon, socialismon kaj sovetan sciencon. Ili forkonfesis genetikon de Mendel kaj nekritike akceptis lisenkismen. Dormo de racio. Tiuj homoj, kiuj Mendel-on fie perfidis, ne estis iuj sovetaj civitanoj, sed ĉeĥoj, moravianoj, silezianoj kaj slovakoj. Tiu trista afero okazis 130 jaroj post naskiĝo de Mendel, nur unu kilometro de la loko, kie en la 19-a jarcento Mendel loĝis kaj laboris!

Foriro de ĉarlatanoj

La 3-an de marto 1953 Stalin mortis. En Sovetunio kelkaj sciencistoj aŭdacis Lisenkon kritiki. Pli ol 80-jara Lepeŝinskaja estis mokita, sed ŝi kun sia filino Olga diligente kolektis „nevivantajn“ birdajn fekaĵojn, en kiuj post bakado en forno serĉis vivantajn ĉelojn...

Kritikistoj akuzis Lisenkon pri trompoj. Iu malkovis, ke branĉojn de avelo oni sur karpenon simple greftis.

Sed rusa pensmaniero estas stranga. Ĉu oni povas puni ordenitajn heroojn? Amikojn de grandaj Lenin kaj Stalin? Nek ĉarlatano Lisenko, nek ĉarlatanino Lepeŝinskaja estis punitaj. Ili trankvile vivis multe da jaroj. Lisenko mortis 78-jara, Lepeŝinskaja ĝisvivis eĉ 92 jarojn.

Ĉeĥoslovakaj sciencistoj pri sia partopreno en ideologia konferenco en Brno (1952) ne fieris. Profesoro Churý, kiu en la jaro 1952 forkonfesis Mendelon kaj Morganon, en la jaro 1966 eldonis novan lernolibron de biologio, kiu enhavas ĉapitron pri heredeco laŭ Mendel kaj kie ankaŭ usonano Morgan estas menciita. Tempoĵ ŝanĝiĝas...

Ĉe tombo de Mendel

Kiam mi studis en Bestkuracista Universitato en Brno (1974 – 1980), tie jam ekzistis katedro de genetiko kaj studentoj studis genetikon de Mendel. Nur el neoficialaj fontoj mi eksciis pri lisenkismo kaj eksperimentoj kun bovidoj en budoj de Steinmann.

En mia laborloko, Bestkuracista Esplorinstituto en Brno-Medlány (1981 – 2002), miaj ĉefoj eksciis, ke mi parolas rusan kaj legas rusan fakliteraturon, tial ili al mi ordonis zorgi pri eksterlandaj vizitantoj.

En la instituto estis la kutimo, ke se alvenis sciencistoj el okcidentaj landoj (Svedio, Francio k. a.), pri ili persone zorgis direktoro, scienca sekretario kaj ĉefoj de departamentoj. Kaj se alvenis rusoj, kiu pri ili zorgis? Fischer. Miaj taskoj estis: alporti la gastojn el flughaveno aŭ fervoja stacidomo, loĝigi ilin kaj zorgi pri ili ĝis ilia forveturo.

Sovetaj gastoj estis bone preparitaj por vizito de Ĉeĥoslovakio, precipe ili devis esti sufiĉe rezistaj kontraŭ ŝoko de pli alta vivnivelo kaj politikaj opinioj de indiĝenoj. Antaŭ veturado ili devis partopreni en politika edukado, kies lektoro estis iu komunisto, ekzemple laboristo. Post edukado la lektoro ankoraŭ ilin ekzaminis.

Ekzemple: „Ĉu vi scias, kial en Ĉeĥoslovakio estas pli alta vivnivelo ol en Sovetunio?“ Se ekzaminata persono (docento, profesoro, inĝeniero, doktoro) intence ne respondis, la lektoro (laboristo) ekridetis kaj edukis ilin: „Ja pro tio, ke Sovetunio al ĉeĥoslovakoj helpas!“ – Ne nur ni en Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ sovetaj civitanoj, precipe edukitaj homoj, estis humiligitaj.

Mi zorgis pri sovetaj vizitantoj ankaŭ post laboro, dum mia libera tempo. Mi al ili montris la urbon Brno kaj aliajn interesajn lokojn, aĉetis teatrajn biletojn kaj precipe kun ili parolis, por pliperfektigi mian scion de rusa lingvo. Ili interesiĝis multe pri vendejoj, kie ili povis aĉeti la varon, kiu mankis en sovetuniaj vendejoj. Mi volis ekscii veron pri vivo en Sovetunio, ĉar libroj de Fučík, Hoffmeister, Luskač kaj aliaj komunistaj aŭtoroj montris nur belecon de la lando, sed ne veron.

Kiam mi dufoje vizitis Sovetunion, tio estis en tempo antaŭ fino de sovetaj militaj aventuroj en Afganio (1979 – 1989), mi vidis sovetan antisemitismon, almozulojn, alkoholulojn, militarismon kaj precipe tristan, senesperan vivon de edukitaj homoj, kiuj en soveta socio devis vivi.

Iam mi en Brno montris al unu sovetunia, pli aĝa sciencistino Muzeon de Mendel. Ni trarigardis la ekspozicion, kiu ankoraŭ ne estis plene aranĝita. Subite mia kunulino trovis malgrandan bildeton, kiu ne estis instalita, nur kuŝis en polvo apud fenestro. Ŝi al mi flustris: „Tio estas Vavilov.“ Mi ne sciis, kiu estis Vavilov, sed en la muzeo, proksime de aliaj vizitantoj, ŝi timis laŭte paroli. Sed ekstere de la muzeo ŝi al mi rakontis pri Vavilov kaj lia

trista sorto. Kiam ŝi studis en la universitato, tiam en Sovetunio ekde la jaro 1948 genetiko de Mendel estis sekreta sciaĵo. Ŝi povis lerni genetikon de Mendel nur kaŝe, por ke soveta reĝimo ŝin ne punu.

Subite ŝi min demandis: „Kie Mendel estas entombigita? Ĉu mi povus meti florojn sur lian tombon?“

Mi respondis: „Kompreneble, ĉe ni estas libereco.“

Mi akompanis ŝin en Centran Tombejon de Brno, kie ŝi aĉetis grandan bukedon. Mi demandis tombistojn, kie situas komuna tombo de monaĥoj-aŭgustinianoj. Tie multaj fratoj el aŭgustiniana ordeno, inter ili sciencisto Gregor Johann Mendel (1822 – 1884) kaj muzikisto kaj komponisto Pavel Křížkovský (1820 – 1885), ripozas post tutviva pena laboro atendante sian revivigon por eterna vivo.

„Jen la tombo de Mendel!“

Mia koleginino kelkajn minutojn silente staris kaj poste ŝi metis sur la tombon de Mendel bukedon de blankaj diantoj.

Rekomendita literaturo

- BUCHAR, J., DUCHÁČ, V., HŮRKA, K. & LELLÁK, J. 1995: Klíč k určování bezobratlých. 1-a eld., Prago, Scientia, 285 paĝoj.
- CHURÝ, J. 1952: Přežívání mendelismu-morganismu v naší veterinární vědě a boj proti němu, paĝoj 323-327. En: MYŠKA, L. (Editoro): Marxisticko-leninskou ideovostí a stranickostí proti kosmopolitismu a objektivismu ve vědě. Sborník dokumentů I. ideologické konference vysokoškolských vědeckých pracovníků v Brně 27. února – 1. března 1952. 1-a eld., Praha, Naše vojsko, 406 paĝoj.
- CHURÝ, J., CRHA, J. & FRAŇO, J. 1966: Biologie se základy zoologie. 1-a eld., Prago, Státní zemědělské nakladatelství, 529 paĝoj.
- DVOŘÁK, L. 1995: Эй, чувак! Ruský slang aneb Český hambář jazyka ruského. 1-a eld., Prago, Horizont, 184 paĝoj.
- FEUCHTWANGER, L. 1973: Goya čili Trpká cesta poznání. 5-a eld., Prago, Obelisk, 534 paĝoj.
- FISCHER, O. A. 2021: El mirinda mondo de dipteroj (Insecta, Diptera). 1-a eld., Brno, MSD, 79 paĝoj.
- FISCHER, O., MACHATKOVÁ, M., PECŮCHOVÁ, L., ZENDULKOVÁ, D. & HOŘÍNOVÁ, Z. 1994: Establishment and characteristics of a cell line from fetal bovine thyroid (FBTY). Acta Veterinaria Brno, 63: 81-87.
- ФРИДЛЯНСКАЯ, И. И., ЧАПКОВА, Ю., НИКОЛАЕНКО, Н. С. & ГОРЮНОВА, Л. Б. 1988: Внутривидовая идентификация культивируемых клеток мыши с помощью типирования H-2 антигенов. Цитология, 30: 1117-1121.
- FUČÍK, J. 1932: V zemi, kde zítra již znamená včera, 1-a eld., Prago, K. Borecký, 433 paĝoj.
- HOFFMEISTER, A. 1956: Dalekohled aneb Kdo nevěří, ať tam běží. 1-a eld., Prago, Státní nakladatelství dětské knihy, 181 paĝoj.
- ЛЕПЕШИНСКАЯ, О. Б. 1952: Развитие клеток из неклеточного живого вещества. 1-a eld., Москва, Государственное издательство культурно-просветительной литературы, 50 paĝoj.
- LUSKAČ, R. 1953: Revír bez hranic. 1-a eld., Prago, Orbis, 293 paĝoj.
- ЛЫСЕНКО, Т. Д. 1950: Яровизация яровой пшеницы, ячменя и овса. 1-a eld., Москва, Государственное издательство сельскохозяйственной литературы, 23 paĝoj.
- LYSENKO, T. D. 1951: O premene biologických druhov. 1-a eld., Bratislava, Oráč, 15 paĝoj.
- КОПЕЦКÝ, V. 1952: Proti kosmopolitismu jako ideologii amerického imperialismu, paĝoj 21-50. En: MYŠKA, L. (Editoro): Marxisticko-leninskou ideovostí a stranickostí proti kosmopolitismu

- a objektivismu ve vědě. Sborník dokumentů I. ideologické konference vysokoškolských vědeckých pracovníků v Brně 27. února – 1. března 1952. 1-a eld., Praha, Naše vojsko, 406 paĝoj.
- ЛЫСЕНКО, Т. Д. 1952: Новое в науке о биологическом виде. 1-a eld., Москва, Государственное издательство сельскохозяйственной литературы, 30 paĝoj.
- PERINGEROVÁ, G. 2021: Projekt Mendel: unikátní výzkum. Magazín M, 11: 6-7.
- PLUHAŘ, Z. 2009: Chemický slovník esperantsko-český a česko-esperantský/Ĥemia Vortaro Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 201 paĝoj.
- POŽÁR, O. 2021: Vzorky Mendelovy DNA z vlasu, zubu a kostí se shodují. Magazín M, 11: 8-9.
- PUTNA, M. C. 2015: Obrazy z kulturních dějin ruské religiozity. 1-a eld., Prago, Vyšehrad, 335 paĝoj.
- СМИРНОВА, Т. Д. & ФРИДЛЯНСКАЯ, И. И. 1985: Контаминация клеточных культур микоплазмами: методы обнаружения и возможные пути распространения микоплазма-инфекции. Цитология, 27: 276-281.
- SOYFER, V. 2005: Rudá biologie. Pseudověda v SSSR. 1-a eld., Brno, V. Reitterová-Stilus, 350 paĝoj.
- TYDLIDÁTOVÁ, V. 2021: Spánek rozumu plodí příšery: ezoterika ve službách ruské hybridní války. <https://www.forum24.cz/spanek-rozumu-plodi-prisery>